

Heinrich Heine, En dolĉega Maj'	Heinrich Heine, En Majo	Heinrich Heine, En la mirinda bela Maj'	Heinrich Heine, En admirinde bela maj'	Heinrich Heine, Im Mai
<i>tradukita de Friedrich Pillath</i>	<i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>	<i>tradukita de Kálmán Ka- locsay</i>	<i>tradukita de Hans-Georg Kaiser</i>	
Printempe en dolĉega Maj', Dum la burĝonoj krevis, El mia koro ĝerme Amsento sin eklevis.	En Majo, kiam ĉiuj Burĝonoj malfermiĝis, La amo kiel floro En mia koro estiĝis.	En la mirinda bela Maj', dum sin burĝonoj fendis, en mia koro la amon mi disvolviĝi sentis.	En admirinde bela maj', dum jam burĝonoj krevis, jen ankaŭ miakore la amo sin eklevis.	Im wunderschönen Monat Mai, Als alle Knospen sprangen, Da ist in meinem Herzen Die Liebe aufgegangen.
Printempe en dolĉega Maj', Dum birda kanto sonis, De l' kora mi sopiro Konfeson al ŝi donis.	En Majo, kiam ĉiuj Birdetoj sin aŭdigis, Al ŝi deziron mian Sopiran mi sciigis.	En la mirinda bela Maj', dum birda trilo ne ĉesis, al ŝi sopiron mian konfide mi konfesis.	En admirinde bela maj', dum birdotril' senbridis, jen mi al ŝi sopirojn, dezirojn, ekkonfidis.	Im wunderschönen Monat Mai, Als alle Vöglein sangen, Da hab' ich ihr gestanden Mein Sehnen und Verlangen.
...

Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

Tiu ĉi traduko aperis en *Elektitaj Poemoj*, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath.

Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982-11-14.

MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.

Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)

Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).

Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17).

Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)

Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyrisches Intermezzo“, Nr. I.